

la Riverego

ISSN 0830-9574

Bulteno de la Esperanto-Societo Kebekia.
Junio 1987. Numero 7-a. Jarkolekto 2-a.

Enkonduko

Jen la somera LA RIVEREGO. Ĝi estas pli serioza ol kutime, ĉar baldaŭ okazos en Maskuto (Saint-Hyacinthe) la komuna kongreso de K.E.A. kaj de ESPERANTO-SOCIETOKEBEKIA, dum kiu estos ĝenerala kunveno. Vi vidu la tiurilatan alvokon kaj proponojn pri statut-amendoj. Mi scias, ke tiaj aferoj, kiaj ĝeneralaj kunvenoj kaj statutoj, povos iujn tedi, sed ili estas gravaj por la progresigo kaj la demokrateco de nia Societo.

Sekve mi esperas, ke ni revidos nin en Maskuto, de la 17-a ĝis la 19-a de julio. □

Letero

ESPERANTO-SOCIETO KEBEKIA ricevis el Usono la jenan poŝtkarton.

Karaj samideanoj,

mi gratulas vin pri la belaj anoncoj pri Esperanto en la aŭtobusoj de via urbo. Kia bela maniero priatentigi la 100-jaran datrevenon de Esperanto! Ĝi permesis ke mi interesigis mian gastigantaron, kiu tiun saman matenon asertis, ke ŝi neniam aŭdis pri E-o. Refoje, gratulojn!

James F. Cool □

Ĉu estraraniĝi ?

Ĉi-jare, dum la Maskuta ĝenerala kunveno, finiĝos la dujara deĵorado de la nunaj estraranoj de la ESPERANTO-SOCIETO KEBEKIA. La membroj devos elekti novajn homojn, kiuj funkciigos la Societon dum la venontaj du jaroj.

La estraranoj kunvenas pli-malpli ĉiun sesan semajnon. Dum tiuj kunvenoj, ili decidas tion, kion faros la Societo, kaj dividas la diversajn taskojn inter si. Ili ankaŭ kontrolas tion, kio estis farenda de la pasinta kunveno, kaj pli ĝenerale kontrolas la progresigon de la Societo kaj de la Esperanto-movado en Kebekio.

La nunaj estraranoj estis Normand Fleury (prezidanto), Patrice Mongeau (vic-prezidanto), Sylvain Auclair (sekretario-kasisto), Victor C. Jaar kaj Remigiusz Mielcarek (konsilantoj). Notu, ke la elektotaj estraranoj dividos mem la diversajn postenojn inter si. □

Bulletin trimestriel de la Société québécoise d'espéranto.

La Riverego estas eldonata de Esperanto-Societo Kebekia. Aperas trimonate.

ISSN 0830-9574. Dépôts légaux: bibliothèques nationales du Canada et du Québec.

Redaktoro: Sylvain Auclair.

Kontribuis Hélène Blais, Suzanne Bolduc, Claude Lebuis kaj Patrice Mongeau.

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.

Senpage por la membroj de E.S.K. Por la aliaj: jara abono: 5 \$ por mara sendo;

6 \$ por aera sendo. UEA-kodo: kebk-d.

Unuopa numero: 0,50 \$ plus sendokostoj.

Adreso: Esperanto-Societo Kebekia

C.P. 126, succ. Beaubien

Montréal, Québec

KANADO H2G 3C8 telefono: (514) 495-8442

Sukcesplena bildkarta ekspozicio

de Patriko Mongeau

Jam antaŭ kelkaj monatoj komenciĝis la laboro por grava evento jubilea. Kvindeko da leteroj estis sendataj ĉien por peti florajn bildkartojn por ekspozicio en la Montreala botanika ĝardeno. Kelkajn tagojn antaŭ la inaŭguro de la ekspozicio, pri ĉio oni ja estis pensinta. Restis por fari la muntado de la ricevita materialo. Necesis entute kelkaj tagoj. Pluraj personoj helpis. Tri cent bildkartojn koloro-kaj-flororiĉajn oni gluis po deko sur grandajn blankajn panelojn. La paneloj plenigis la ekspozician ĉambron, montrante diversspeciajn florojn el ĉirkaŭ tridekkvin landoj, en kiuj esperantistoj helpemaj reagis al nia peto.

Ĉeestis la inaŭguron proksimume sesdek invititaj vizitantoj, el kiuj multaj Kebekiaj esperantistoj. La inaŭguro okazis la 11-an de junio vespere. Trinkajon kaj manĝaĵon ĝuis la vizitantoj alvenante. Nia prezidanto Normando Fleury alparolis dum kelkaj minutoj por prezenti la ekspozicion, ĝian celon kaj facilan realigon dank'al internacia lingvo. La prezidanto de U.E.A., Humphrey Tonkin, honoris nin per sia ĉeesto. Ankaŭ li faris etan alparolon, kiun tradukis francen Normando por la neesperantista ĉeestantaro.

Oni povis poste aŭdi parton de la nova disko de Joelle Rabu, Kanadanino kantante interalie esperante. Ni ricevis tiun diskon kelkajn tagojn antaŭ la ekspozicio. Nome de la Societo, Normando lotumis unu diskon kaj unu kasedon de Joelle. Journalisto de radiostacio gajnis unu kaj promesis ĝin aŭdigi per radioelsendo.

Normando tranĉis rubandon, malfermante la ekspozicion. Dum tiu unua vespero, krom la bildkartoj, oni montris librojn kaj disdonis flugfoliojn. Poste, dum dek tagoj, la vizitantoj de la flordomoj de la botanika ĝardeno povis viziti ankaŭ nian ekspozicion kaj preni flugfoliojn pri esperanto. Ĉirkaŭ mil vizitantoj venas ĉiutage. Kelkaj esperantistoj deĵoris dum pluraj horoj helpante varbi Esperanton kaj klarigante la ekspozicion al la vizitantoj.

Tiu ekspozicio certe multe helpis disvastigi Esperanton. Oni atingis ne nur la vizitantojn, sed ĉiujn gazetojn, ĉar la Montrealaj urbaj instancoj sendis al ili invitilon kaj komunikaĵon. Sekve, kelkaj anoncoj aperis en kelkaj gazetoj, kaj venis ĵurnalisto. El la flugfolioj disdonitaj, jam revenis kelkaj unuaj lecionoj de la perpoŝta kurso.

Tiu sukceso ne estu la lasta. La sukceso devas kuraĝigi nin! Dankon al ĉiuj kiuj sendis bildkartojn, helpis la preparadon de la ekspozicio kaj deĵoris. Specialan gratulon al Normando, kiu havis la ideon fari la ekspozicion kaj plene respondecis pri ĝia organizo. □

Alvoko

La estraro de la ESPERANTO-SOCIETO KEBEKIA invitas ĉiujn societanojn ĉeesti la jaran statutan ĝeneralan kunvenon de E.S.K., kiu okazos ĉe la komuna kongreso de la Kanada Esperanto-Asocio kaj de la ESPERANTO-SOCIETO KEBEKIA, en Maskuto (Saint-Hyacinthe), sabaton 18-an de julio 1987-a, je la 13-a horo. La tagordo estas jena :

0. Malfermo.
1. Raportoj de la estraranoj.
2. Statut-ŝanĝoj (la proponitajn statut-ŝanĝojn vi trovos aliloke en tiu ĉi bulteno).
3. Elekto de la estraranoj por la venonta deĵor-periodo.
4. Estonta agado.
5. Aliaj.
6. Fermo.

Por la estraro, la sekretario-kasisto,



Sylvain Auclair ☐

Amend-proponoj

La estraro decidis proponi al la membroj de E.S.K. la jenajn statut-amendojn. Ili ĉiuj celas pliefikigon kaj plifaciligon de la laboro de la estraro. Vi trovos en tiu teksto numerojn de paragrafoj de la nuna statuto, kiun ĉiu interesata membro jam povis peti. Statutoj estos haveblaj ĉe la ĝenerala kunveno.

Amendo 1: (Ĝi celas altigi la kotizon de la Amikoj, tiel ke ili povu ricevi LA RIVEREGON, kiu tiam estus dulingva, kiel ni jam anoncis en pasinta LA RIVEREGO.)

10,7 : Aprobanta membro pagas ĉiujare 80 % (okdek procentoj) de la baza kotizo.

Amendo 2 : (Ĝi celas forigi la kotiz-sistemon, laŭ kiu ĉiuj kotizoj estas proporcie elkalkulitaj de baza kotizo, kaj la

estraro fiksas nur tiun bazan kotizon. Notu, ke aprobo de tiu amendo nuligus aprobon de la unua.)

6,4 iĝas: Dumviva membro estas persono, kiu pagas unufoje grandan specialan kotizon.

9,4 : *forigita*.

10 : Ĉiujare, dum la statuta ĝenerala kunveno, la estraro povas ŝanĝi la kotizojn por unu aŭ pluraj membro-kategorioj por la venonta kalendara jaro.

Amendo 3 : (Ĝi celas plifaciligi la nune tre komplika kvorum-sistemon. Tiel estu nur unu kvorumo.)

13,6-8 : *forigitaj*.

13,6 iĝas: Kvorumo estas kvarono de la voĉdonrajtaj membroj.

14,1 e) *forigita*.

Amendo 4 : (Ĝi celas plifaciligi statut-ŝanĝojn. Nuntempe estas tre malfacile kaj multekoste, pro la verŝajne bezonata referendumo, ŝanĝi, eĉ iomete, la statuton. La proponita maniero estas tiu de la Leĝo pri asocioj. Plej multaj asocioj funkcias tiel.)

18 iĝas 19

18,1 : La estraro rajtas amendi tiun ĉi statuton, ĉe limoj preskribitaj de leĝo.

18,2 : Tiuj amendoj validas nur ĝis la venonta kvoruma ĝenerala kunveno, kiam la membraro rajtas akcepti aŭ rifuzi la amendojn.

18,3 : La estraro devas meti en la tagordon de iu ĝenerala kunveno eron pri statut-amendo, se tion postulas almenaŭ du membroj. Tiukaze, dum la ĝenerala kunveno, la membroj pridiskutas la amendo(j)n kaj, se kvorumas, akceptas aŭ malakceptas ĝin (ilin).

13,9 : *forigita*

14,1 ĉ) : *forigita*

Amendo 5 : (Ĝi celas tute renovigi la membro-kategoriojn, kiuj nun estas iom ĥaosaj kun la ĉiuj malsamaj kotizoj. Estu nun malpli da kategorioj, kaj ili estos pli simplaj.)

Artikolo 6 iĝas:

6.1 : Ordinara membro estas parolanto de la Internacia Lingvo, kiu ordinaro aliĝas al E.S.K..

6.2 : Favor-kotiza membro estas parolanto de la Internacia Lingvo kiu volas aliĝi al E.S.K., sed kies rimedoj ne ebligas pagon de ordinara kotizo. La estraro decidas por tiaj membroj pri malpli alta kotizo.

6.3 : Familiaj membroj estas ĉiuj anoj de samadresa grupo, kiuj ĉiuj parolas la Internacian Lingvon, kaj kiuj aliĝas al E.S.K. kiel grupo. Ili ricevas nur unu ekzempleron de la poŝtaĵoj senditaj de la Societo (krom balotiloj). La grupo devas pagi kotizon, deciditan de la estraro, pli altan ol tiu de la ordinaraj membroj.

6.4 : Dumviva membro estas parolanto de la Internacia Lingvo, kiu pagas unufoje specialan grandan kotizon.

6.5 : Amiko de Esperanto estas aprobando de la Internacia Lingvo. Ĝi ne havas voĉdonan rajton.

Artikolo 8 : *malaperas*. □

MEKa paĝo

de Patriko Mongeau

Lastmonate, nur du personoj ĉeestis la kluban vesperon. De januaro ĝis aprilo, multaj klubanoj renkontiĝis ĉiumonate, kaj la vesperoj estis agrablaj. Okazis prelegoj, informado, kantado kaj babilado. Kelkfoje okazis konversacia rondo kun malmultaj personoj. Eĉ en aprilo venis multaj homoj malgraŭ la aŭtobusstirista striko.

Kial subite neniu venis en majo? Ĉu pro la pli milda vetero? Ĉu pro tio, ke la vesperoj ne plaĉis? Ĉu la vesperoj devus esti pli oftaj? Kion vi ŝatus fari dum tiuj vesperoj?

La klubaj vesperoj daŭre okazos dum la somero :

lunde, la 6an de julio

lunde, la 3an de aŭgusto

lunde, la 7an de septembro

Kial ne fari poezian vesperon? Ni atendas vin kaj viajn ideojn. Ni ŝatus plivigli la kluban vivon. Ne eblas ke esperantistoj ne estu agemaj ! □

Poemo

Virino esti kaj verki

Virino esti
kaj verki
kvazaŭ
elĉerpante sin ĉe l'akvo
en tero Afrika
porti tion surkape
mil subitaj koksoluloj polvaj
ĉiuj paŝoj feliĉe stivataj

subteni
argilajn botelegojn el inventemaj nuboj
surkape

verki
al tio
reveni senĉese
el puto
al
la
peno

perloj ŝvitaj sur la korpo
malvarmetaj rondaj
kun paŝado silenta

la longaj dancoj
de virinaj roboj
surskribas
tekstojn de
premsignoj
sur la varmego de hazardoj

fari
refari
la ĉiutagan vivon
ĉiuj lokoj
kaŝanguloj
de labormovoj
de amomovoj

virinoj esti
prizorgi
la fajrejon gluan de molhorloĝetoj
kaj verki
plurkolorajn ribelantinojn

desegnoj
inkrustitaj vortoj
voĉ' de pluraj voĉoj
en la haŭto de iliaj malĉastaj korpoj
ilia tempo lumfuĝema
ilia spaco reatingita surŝprucigita resaltita
koagulas
prisilentas la singultojn
de mandriloj muelitaj

la plenplenaj ateneoj
voluptemaj
daŭre naskas
poeziaĵojn
gronditajn putmuretajn

ili igas pensadi
kiel
oni donas trinki

Helena Blais
la unuan de marto 1987
Tradukis Klaŭdo Lebuis
© *Eldonejo Ondo, 1987*

Hélène Blais kaj Claude Lebuis estas Amikoj de Esperanto de E.S.K.
ELDONEJO ONDO estas de ili ĵus fondita eldonejo, kiu celas eldoni
franclingvajn kaj Esperant-lingvajn verkojn.
La tekston korektis Suzanne Bolduc. □

La Riverego

Esperanto-Societo Kebekia
Junio 1987-a. N-ro 7-a

Ĉi-numere:

Bildkarta ekspozicio

Dokumentoj pri la ĝenerala kunveno

Estraraniĝu !

Virino esti kaj verki.

Société québécoise d'espéranto

C.P. 126, succ. Beaubien

Montréal, Québec

H2G 3C8